

JUNIO 2009



Vizito de Taeko el Hiroŝimo

La deksepa de majo 2009, eksterordinara tago. ! Fakte la grupo de geesperantistoj potevanaj akceptis Taeko'n, Osioka'n, japanan esperantistinon, vizite Francien.

Taeko, ĵus emerita instruistino, loĝanta en la urbo Hiroŝimo, estas ĉarma ridetanta virino. Al ni ŝi konigis kelkajn japanajn kutimojn.

Komence, ŝi humile klarigis la sencon de sia antaŭnomo : Tae signifas « delikatan » kaj ko « knabinon aŭ virinon ». Dum la manĝo, ŝi uzis manĝbastonetojn el bambuo por gustumi kelkajn lokajn specialaĵojn, aperitivon, rozajn vinojn, la tre ŝatitan fazanpasteĉon, blankajn fazeolojn.

Post la manĝo, al ni ŝi faris la honoron prepari la teoceremonion per precizaj gestoj kaj diversaj iloj kies unu el ili memorigas la nazpenikon de niaj avoj ! Tiu ilaro estas enmitita en rafinitan ujon. Unu post la alia ni trinkis la teon verdkoloran akompanantan de speciala sukeraĵo.

Taeko ne mankis saluti ĉiu el ni donacante la teotason. Ni ne havis konscion pri nia manko de etiketo (ceremoniaro) ĉar samtempe ni multe babilis, sed Taeko, indulgema, adaptiĝis al nia konduto.

Mirinda momento estis la rakonto de Taeko. Per ĵurnala paperfolio kaj sinsekvaj faldoj, Kaeto ilustris « la fabelon de sinjoro papero », fakte la naskiĝon de amikeco inter la envia reĝo kaj la malriĉa, bonkora sinjoro Papero.

Taeko, je la peto de Catherine, prezentis la unuan parton de la fabelo, japane. Tiu lingvo saĝnis tre dolĉa, agrabla je niaj oreloj.

Marie France ĉarmis nin, per la interpretado de la « Truto » de Schubert. Kaeto kantis per belsona voĉo ; ŝi montris al ni belajn pentraĵojn ĵus manfaritajn, rilate memoraĵojn pri sia vojaĝo kaj restado en Francio.



Posttagmeze la vetero pliboniĝis kaj ni decidis promenadi per plata barko en la Potevana marĉo por montri al Taeko la belecon de nia regiono. Piedirante sur la strateto de la vilaĝeto « La Garette », ŝi fotis elpendaĵon de restoracio, kie estas skribita « La mangantoj de helikoj », « Les mangeux de lumas ». Si raportis ke en sia lando, ŝi marŝadas dum dekdu horoj por viziti jarmilajn insulajn arbojn.

Tagfine, Taeko konsentis adiaŭi laŭ la franca maniero, tio estas per kisoj. Se iu el ni, vizitas Japanion, ŝi plezure akceptos la vizitanton hejme, aldirante ke ŝia edzo bone kuiradas !



Vive la lingvo Esperanto,
kiu ebligas belajn renkontojn
kaj riĉajn interŝanĝojn inter la alilandaj homoj.